

EKO 2024

TRA LA
MONDO
IRAS FORTA
VOKO

Numero 2024-18; majo 4.

Pezo: Word 40, PDF 260 KB. Sume 300 KB. Sveltaj PDF-dokumentoj por pli sana mondo! Dankon al Aleks Kadar pro la konsciigo pri tio! Malnecese pezaj PDF-dokumentoj kontribuas al globa varmigo!

AMO 109 en Kubo – interkultura kunlaboro

La oka Kuba Esperanto-Renkontiĝo (KER) gastigis la 109-an AMO-seminaron pri interkultura kaj tutamerika kunlaboro. La 8-a eldono de KER kaj 109-a AMO-seminario arigis en la Esperanto-centro de Havano de la 14-a ĝis 17-a de aprilo entute 44 geesperantistojn el Kanado, Brazilo, Francio, Italio kaj Kubo, koincide kun signifaj datrevenoj por Kubo kaj la Eo-komunumo entute.

KER estis ligita al historia okazintaĵo: aprilo 1904 markis la momenton, kiam Esperanto ekdisvastiĝis en Kubo.

Tion oni povas legi en la libro *Esperanto en Kubo* (Komentita Historio) verkita de Juan Ramón Rodríguez, historiisto de KEA, kie li sciigas, ke la hispana pastro Ricardo Vicente estis la unua persono, kiu faris propagandan laboron por Esperanto en Kubo.

Lerninte la lingvon en Hispanio, pastro Ricardo eklaboris por Esperanto en la insulo instruante la lingvon al la unuaj interesiĝintoj rezultintaj el la propaganda laboro. De tiu unua momento ĝis la estiĝo de la nuna Kuba Esperanto-Asocio pasis 75 jaroj, sed pli ol unu jarcenton pasis entute, 120 jaroj, de tiu momento kiam Esperanto komencis fariĝi ilo por interkultura komunikado en Kubo.



Terminologio kaj ni

Antaŭ iom pli ol dek jaroj UEA atingis bonan pozicion ĉe la Internacia Organizaĵo por Normigado (ISO). La laboro de ISO estas organizita en diverstemaj teknikaj komitatoj (TC), inter kiuj la plej proksima al UEA estas TC37 'Lingvo kaj terminologio'. UEA ricevis ĉe TC37 kaj ĝiaj kvin subkomitatoj oficialan statuson, eĉ en la plej grava kategorio A. Mi ne scias, ĉu UEA plu zorgas pri rilatoj kun TC37, sed ĝi almenaŭ plu konservas sian statuson, kiel videblas en la retejo de TC37:

<https://www.iso.org/organization/10045.html>

Apud ISO, UEA aktiviĝis ankaŭ ĉe Infoterm, t.e. Internacia Informejo por Terminologio, fondita de Unesko, kaj estis akceptita kiel ĝia membro en 2011. Laŭ

peto de Infoterm UEA provizis esperantigon de la dokumento *Gvidlinioj por terminologiaj politikoj*, legebla en la retejo de Infoterm:

http://www.infoterm.info/publications/documents/GuidelinesforTerminologyPolicies_2005Final_eo.pdf.

La aktiveco de UEA kulminis en tio, ke ĝia tiama reprezentanto Mélanie Maradan estis elektita al la estraro de Infoterm por la periodo 2013-2016. Ĉar mi emeiritiĝis en 2016, mi ne konas postajn evoluojn ĉi-kampe kaj tial bonvenigus ĝisdatigajn informojn pri la afero. La atingoj ĉe ISO/TC37 kaj Infoterm rezultis el pli fruaj aktivadoj, i.a. de Terminologia Esperanto-Centro (TEC), kiu bedaŭrinde de longe dormas. Motoroj estis Wera kaj Detlev Blanke (*SMG*: kaj la siatempa centro en Budapeŝto). Interesitoj bv. konsulti la artikolojn pri TEC, ISO/TC37 kaj Infoterm en Vikipedio.

Osmo Buller, Finnlando

SMG: Jen defio por la nuna estraro de UEA, kadre de la Scienca agado. Kial UEA toleras la multjaran dormadon de sia aliĝinta Faka Asocio? *Jam temp' esta forigi la kadavran ISAE el la listo de vivantaj fakaj asocioj.* Ne mankas al ni sciencistoj, kial ISAE rajtas tra la jaroj mortegadi?

Marjorie Boulton en la memoro

La 7-an de majo Esperantujo festas la centan naskiĝ-datrevenon de Marjorie Boulton. Sed en majo 2024 estas ankaŭ aliaj jubileoj: ne forgesu gratuli la eldonistojn Gersi Alfredo Bays (90-jariĝo) kaj Brunetto Casini (70-jariĝo), kaj rememoru pri Émile Javal, Emilija Lapenna, Vida Jerman, Hideo Yagi kaj pri aliaj okaze de iliaj datrevenoj. Vidu la liston de Esperantaj jubileoj por majo 2024, kiun kompilis Aleksander Korĵenkov, en *La Ondo de Esperanto*: <https://sezonoj.ru/2024/05/majo-10/>

Unesko subtenas handikapulojn

Por prepari kongreson pri SPORTO KAJ LABORO DE HANDIKAPULOJ ĉe Unesko en Parizo en septembro, la organizantoj pere de s-ano Lo Jacomo sendis peton por subteno el la tuta mondo. Se vi interesiĝas, estas enketilo plurlingva, Esperanto-versio troviĝas sur la lastaj du paĝoj. Petu tion rekte de UMEA ĉe la subskribinto. Se vi volas helpi, bv. respondi al d-ro Marc Rozenblat (Rozenblat.marc@gmail.com). Vi rajtas dissendi la tuton al viaj konataj organizoj en viaj landoj.

Christoph Klawe, prezidanto de UMEA

Obstakloj kaj klarvido por blinduloj el Kongo DR

En 2017 ene de Konga Esperanto-Asocio kreiĝis fakgrupo de blinduloj. La instruado de Eo al blinduloj ne estus facila, sen la helpo de la Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE), funkcia ene de UEA. Ja la administrantoj de LIBE, nome ges-roj Nedeljka Lozaljĉ, Rob Moerbeek kaj Pier Luigi Da Costa, kiujn ni ĉi-okaze dankas, sendis al ni brajlajn materialojn por lerni Esperanton. Estas kun granda entuziasmo, ke la blinduloj malkovris kaj eklernis Esperanton. Sed tuj kiam ili komencis organizi sin por etendiĝi tra aliaj provincoj de la lando, la impeto estis haltigita pro la apero de kovimo, kiu fine izoligis la tutan homaron.

Ĉiaj renkontiĝoj estis malpermesitaj. Eĉ la agrikulturaj agadoj, kiujn niaj blindaj amikoj kuraĝe komencis, estis devige ĉesigitaj en 2020. Intertempe, kelkaj el niaj

kunuloj bedaŭrinde perdis la vivon. Tamen, ekde januaro 2023, ni sukcesis iom post iom kunigi grupeton ĉirkaŭ ni por reanimi la lumon de la verda stelo.

Kaj jen kial ni ĝojas anonci hodiaŭ la revekigon de Konga Ligo de Blindaj E-istoj. KOLIBE. La grupo restas ligita al DKEA, nia landa asocio, kaj kompreneble al LIBE. En la membroj de la nuna grupo estas dek membroj – sep blindaj kaj 3 vidantaj.

Sidejo: Av. des aveugles N^o 1, Cité des Aveugles,
Avenuo de blinduloj en la urbo de blinduloj, C/Mont Ngafula, Kinshasa.

Ĉina artisto

Jen Intervjuo kun Atman One, la ĉina artisto, kiu donis sian mur-pentraĵon por la filmo *Sgrafitoj* de MA-GA Filmoj.

<https://esperanto.cri.cn/2024/04/19/ARTI9HS1LrjiNDxkyUcMEu8h240419.shtml>

Alessandra Madella

UN kaj multlingveco

Unuiĝintaj Nacioj havas strategian planon por multlingveco. Ĝi disponeblas en la ses UN-lingvoj <https://www.un.org/sg/fr/multilingualism/index.shtml>

La 21-a de aprilo estis la tago de la ĉina lingvo
(<https://www.un.org/fr/observances#multilingualism>).

La 23-an de aprilo estis la tagoj de la angla kaj hispana (samtage!).

“Ne estas mirinde, ke Unuiĝintaj Nacioj festas samtempe la 23-an de aprilo kiel tagon de la hispana kaj angla lingvoj. La koincido estas tre interesa kaj kurioza: tiu tago estis elektita por memori pri du grandaj verkistoj kaj omaĝi al ili: Miguel de Cervantes Saavedra kaj William Shakespeare. Cervantes estas la aŭtoro de *Don Kiĥoto* kaj Shakespeare estas la plej grava verkisto en la angla lingvo. Ambaŭ mortis en la sama tago, la 23-an de aprilo 1616. Tiu koincido emfazas la signifon de lingva diverseco kaj la kontribuon de ambaŭ lingvoj al la tutmondaj literaturo kaj kulturo.”
skribis Pablo León en Kostariko <opleon@gmail.com>.

Didier Janot (FR) kaj Leoni de Leon (xx)

Balkane

Aprile kunvenis la ĉiumonata balkana kunlabora grupo. Oni raportis pri la progresoj en la organizado de la Eo- kongreso okazonta inter la 17-a kaj 24-a de aŭgusto 2024 en Beogrado, kiu estos samtempe la 88-a Internacia Kongreso de Blindaj esperantistoj (IKBE), IKK-seminario de SEL/UEA: Trejnseminario pri interkultura komunika kompetento, instrukapabligo kaj aktivula lertigo, Tagoj de ILEI: regiona renkontiĝo de instruistoj kaj ILEI-anoj de balkanaj kaj danubaj landoj, Rezulte de la enketo inter la esperantistaro realigata de la serba ILA kunlabore kun la fakultato pri filozofio de la universitato de Beogrado, evidentas, ke homoj Esperanton emas lerni de inter 15 kaj 30 jaroj, do al tiu aĝgrupo ceiu nia varbado.

Grimpi la plej altan monton en Afriko

Ĉu vi ŝatus grimpi Kilimanĝaron kun esperantistoj ĝis la pinto de la monto antaŭe la antaŭkongresaj ekskursoj de la 109-a Universala Kongreso de Esperanto? La grimpadado okazos de la 22-a ĝis la 28-a de julio 2024. Jam aliĝis esperantistoj al tiu neforgesebla ekskurso. Se vi interesiĝas, tuj kontaktu la LKK-n de la 109-a UK per: esperantotz@gmail.com. Spektu la filmeton de la antaŭa farita grimpadado kun la esperanta flago ĝis la pinto:

<https://youtu.be/qQW0rfCZml8?si=Fol4OSzj8DvpRtFG>

Sekvu nian kongresan paĝon <https://www.facebook.com/share/p/WsfLwLSMejEg7DeW/?mibextid=oFDknk>

Aliĝu al la 109-a UK ĉe uk.esperanto.net

SMG en frivola humuro: Prepare al la grimpo, pretigu Kilo-manĝaron

La 57-a ILEI-Kongreso kaj Simpozio hibride

ILEI ĉiujare okazigas gravegan kongreson por ni, instruistoj, ne nur pri Esperanto sed ankaŭ pri aliaj lingvoj kaj fakoj. Ni bonvenigas ankaŭ lernantojn, homojn, kiuj interesiĝas pri instruado, kaj ĝenerale ĉiujn esperantistojn de kiu ajn lingvo-nivelo. En 2024, la 57-a Kongreso de ILEI denove okazos hibride: virtuale kaj ankaŭ ĉeeste en la paradiza urbo Maceió en la nordoriento de Brazilo.

<https://2024.kongreso.org/>. La ĉefa temo de la Kongreso estos: 'Esperanto por justa edukado'. Venu plibeligi nian kongreson per via ĉeesto kaj aktiva agado.

Laura Brazzabeni, ILEI, Estrarano pri kongresoj

===== vortoj: 1330 =====

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)



La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikoj estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <https://www.ilei.info/agado/EKO.php>

La unuaj dek numeroj de 2024 nun aperas tie, kune kun la kolekto el 2023

ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN: Skribu al stefan.macgill@gmail.com. Por forigoj, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apertenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadreso estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.